

BAPTO DE LA SINJORO – 12an de januaro 2014

**TUJ POST LA BAPTO, JESUO VIDIS LA SPIRITON DE DIO
MALSUPRENIRANTAN SUR LIN – Komento al Evangelio de p. Alberto
Maggi OSM**

El Evangelio laŭ Mateo 3,13-17

En tiu tempo Jesuo venis el Galileo al la rivero Jordano, kaj alproksimiĝis al Johano, por esti baptata de li.

Sed Johano klopodis rifuzi tion, dirante: "Mi devus esti baptata de Vi, kaj ĉu Vi venas al mi?". Sed Jesuo respondis: "Lasu nun, ĉar estas oportune, ke ni plenumu ĉion, kio estas justa". Tiam Johano konsentis.

Tuj post la bapto Jesuo eliris el la akvo. Tiam la ĉielo malfermiĝis, kaj Jesuo vidis la Spiriton de Dio, malsuprenirantan kiel kolombo sur Lin. Kaj aŭdiĝis voĉo el la ĉielo: "Ĉi tiu estas mia Filo, kiun Mi amas kaj ŝatas".

La agado de Jesuo en la evangelio de Mateo malfermiĝas kaj fermiĝas sub la signo de la bapto. En la peco kiun ni nun vidos Jesuo estas baptata kaj per la bapto Jesuo iĝas videbla manifestiĝo de la ĉeesto de la Patro en la homaro kaj la lastaj vortoj de Jesuo al liaj disĉiploj, kiam li estos resurektinta, estos ilin sendi bapti en la nomo de la Patro, de la Filo kaj de la Sankta Spirito.

Tio signifas esti videbla manifestiĝo de la pleneco de la Dia amo kaj ĝin spertigi al ĉiu persono. En la evangelio de Mateo, tuj kiam Jesuo aperas

surscenejen, tuj komenciĝas la problemoj. Skribas fakte la evangeliisto en la ĉapitro 3, versiklo 13, *"En tiu tempo Jesuo venis el Galileo..."*. Ĉi tie la evangeliisto utiligas la saman verbon utiligitan por la apero de Johano la Baptisto.

Per ĉi tiu literatura artifiko la evangeliisto volas indiki ke en Jesuo estas la plilongigo kaj la kompletigo de la agado de la Baptisto. *"al la rivero Jordano, kaj alproksimiĝis al Johano, por esti baptata de li"*, ekde ĉiam en la eklezio kaŭzis problemojn la bapto de Jesuo. Se la bapto de Jesuo, kiel anoncadis Marko, celis obteni la pardonon de la pekoj, kial Jesuo iris sin baptigi?

Se la bapto de Jesuo, kiel en la evangelio de Mateo, celas la konvertiĝon, tio estas ŝanĝiĝon de propra konduto, de malĝusta konduto al iu orientita al la bono de la homoj, kial Jesuo iras sin baptigi? Ĉu li bezonis konvertiĝon?

La bapto estas simbolo de morto, morto al tio kio oni estis, por akcepti la novan vivon. Ankaŭ por Jesuo la bapto estas simbolo de morto, sed ne rilate al pasinto, ĉar li ne havas malĝustan pasinton forigendan, sed morto en la senco de akcepto de morto en la estonto por esti fidela al la volo de la Patro kaj manifesti lian vizaĝon de amo. Jesuo parolos pri tiu bapto ĝuste kiel simbolo de morto. En la evangelio de Marko li diros: *"Ĉu vi povos ricevi la bapton per kiu mi estis baptita?"*

La bapto estas do simbolo de morto. Se por la popolo temas pri simbolo de morto je la pasinto, por Jesuo ĝi estas je la estonto. Nu Mateo skribas: *"Sed Johano klopodis rifuzi tion"*, ĉar tiu Jesuo iras por sin baptigi kiel se ankaŭ li bezonus konvertiĝon, ne agas laŭe kiel la mesio kiun Johano la Baptisto anoncadis, la ekzekutista mesio, la mesio kiu venas por juĝi, por premii kaj puni, kiu venas bapti en la Sankta Spirito, sed ankaŭ per la fajro, tiu kiu venas bruligi la grenventumaĵon.

Johano la Baptisto do protestas kaj diras: *"Mi devus esti baptata de Vi, kaj ĉu Vi venas al mi?"*. Sed Jesuo respondis: *"Lasu nun, ĉar estas oportune, ke ni plenumu ĉion, kio estas justa"*. La vorto 'justeco' en la Malnova kaj en la Nova signifas fidelecon, fidelecon al interligo. La justeco de Dio konsistas en lia fideleco al interligo, ankaŭ se la homoj povas ĝin forlasi, ankaŭ se la popolo povas ĝin perfidi, Dio estas ĉiam fidela al la interligo kaj al sia popolo.

Kaj la homo estas justa, nome la justeco de la homo, kiam li estas fidela al ĉi tiu interligo. Jesuo do invitas esti fidela al la interligo, tio estas plenumi la volon de Dio. Kaj ĉi tie la evangeliisto metas strangan esprimon kiun oni trovas nur du fojojn en la evangelio de Mateo, ĉi tie kaj je la fino de la tentoj en la dezerto, kiam oni legas ke *"tiam la diablo lin forlasis"*. Ĝi estas la sama frazo.

"Tiam Johano lin lasis", Johano la Baptisto lasis lin. Ne estas "konsentis", kiel iuj tradukistoj klopodas poste kompletigi la frazon. "Tiam li lin lasis", ĝuste kiel la diablo. La evangeliisto volas indiki ke tiu por Jesuo estas la unua tento: esti la mesio atendata de la popolo, la mesio anoncita de la tradicio. Li estintus tiel tuj rekonata, akceptata kaj aklamata.

Male Jesuo devos liberigi la popolon de tiu ideo pri la mesio por prezenti alian tute malsaman, ne mesio de potenco, sed mesio de amo, ne mesio de regado, sed mesio de servado.

Nu, *"Tuj post la bapto Jesuo eliris el la akvo"*, la akvo estas simbolo de morto, do la evangeliisto antaŭas tion kio estos la resurekto de Jesuo. *"tiam la ĉielo malfermiĝis"* la ĉielo estas la hejmo de Dio, *"kaj Jesuo vidis la Spiriton"* - la artikolo 'la' indikas la totalecon - *"Spiriton de Dio"* por indiki la plenecon de la amo, de la energio, de la vivo de Dio, *"malsuprenirantan kiel kolombo sur Lin"*

Kiu estas la signifo de la simbolo kolombo? Ĝi estas duobla. Unu estas la rilato al la libro Genezo, en la rakonto pri la kreado, kie legeblas ke *"la Spirito de Dio ŝvebadis super la akvoj"*, do la evangeliisto vidas en Jesuo la veran novan definitivan kreadon volatan de Dio. Kaj la alia referencas al proverbo en kiu oni referencas al la amo de la kolombo al sia nesto.

La kolombo estas fidela al sia nesto, ankaŭ se oni ĝin ŝanĝas, faras pli bela, pli nova, ĝi estas ĉiam fidela al sia origina nesto. Jesuo do estas la nesto de la Spirito, estas la hejmo de la Spirito, tie hejmas la pleneco de la amo de Dio.

"Kaj aŭdiĝis voĉo el la ĉielo" la ĉielo indikas la dian hejmon, kaj ĉi tie la evangeliisto kunfandas tri tekstojn de la Malnova Testamento. Li fandas la psalmon 2, la libron Genezo je la ĉapitro 22 kaj Jesajan je ĉapitro 42. *"Ĉi tiu estas mia Filo"*, tio estas la surtronigo de la mesio, Jesuo do estas konfirmita de Dio kiel la mesio, tiu estas la citaĵo de la psalmo.

"*La amata*", celas la ununuran filon, tiu kiu heredas ĉion, kaj estas aludo al Izaako, al la filo de Abrahamo, kiun Abrahamo volis oferbuĉi por la diaĵo. "*Mi lin amas kaj ŝatas*", kiu estas citaĵo de profeto Jesaja, en kiu videblas la agado de la mesio volata de Dio. En Jesuo do manifestiĝas tute kaj plene la volo de Dio, kiu vidas en li kaj en lia agado la mesion. En li ne estas kontraŭstaro kun Dio ĉar li estas la filo, tio estas tiu kiu similas tute al la Patro kaj li estas la amata, la ununura filo, tiu kiu heredas ĉion de la Patro.

Ne eblas distingi Jesuon disde Dio, sed, vidante Jesuon, oni komprenos kiu estas Dio, iu Dio tute malsama de tiu kiun la tradicio atendadis.